# EKO 2025

**Stela sukceso**

EKO 2025-34, Aŭgusto 20 Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sume: 540 KB.

## Stela atingo en nia eta firmamento

En 2024 oni starigis la *Premion Maertens* por marki la centjariĝon de grava figuro de la Esperanto-movado, Grégoire Martens, prezidinto de UEA en la jaroj 1980-86. Pri la premio oni skribas: "La premio, aljuĝata ĉiujare, honoras esperantiston aŭ esperantistan organizaĵon kiu per siaj realigoj grave kontribuis kaj pli kontribuos (!) al la evoluigo de la Eo-movado. Malsame ol aliaj movadaj premioj, la Premio Maertens ne nur rigardas al la jamaj atingoj sed metas emfazon al la potencialaj estontaj kontribuoj de la premiito. La premio por la jaro 2025 estis aljuĝita al la juna Stela Besenyei-Merger "pro ŝiaj originalaj, inspiraj kaj plurflakaj kontribuoj al la organiza kaj kultura vivo de la Eo-movado. Stela estas denaska esperantistino, filino de franca patro kaj hungara patrino. Vaste konataj estas ŝiaj blogo "Stela ĉiam nur kritikas" kaj ŝia retejo "La bona renkontiĝo" (wwww.laboren.org), Ŝi estas certe unu el la plej famaj denaskuloj ankaŭ ekster la Esperanto-movado pro mallonga sinprezenta video. farita en 2020 sub la aŭspicio de *Wikitoungues*. Ĝi ricevis pli ol 800 000 spektojn ĝis nun. (...)"

## Bona Brna rezulto




1132 personoj el 63 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, en Brno (Ĉeĥio), la plej multaj aliĝintoj venis el Ĉeĥio (133), Germanio (122) kaj Pollando (111). Intertempe ekfunkciis la reta aliĝilo al la 111a UK, kiu okazos Ikomence de aŭgusto 2026 en Graco (Graz, Aŭstrio). Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/08/brno-34/

## La bongusta bonvena bruna biero de Brno

Laŭ mia scio, tio estas la unua fojo en kiu UK vendis kongresan bieron. Plano ripetinda, ne nur por gajigi la kongresan etoson, sed por preni kontakton kun bierfabriko produkti aparte ladskatolojn kun la menciita biero. Tio signifas, ke tiu kompanio estas konvinkita, ke la kongresantaj esperantistoj formas merkaton sufiĉe signifan por organizi la produktadon. La alporto kaj bildo dankendas al Perla Mielo.

## Katalunoj esprimas sin pri la tragedio de Gazao

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis oficiala komuniko de Kataluna Esperanto-Asocio pri la nuntempaj okazaĵoj en Gazao.
Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2025/08/gazao/

## Brandenburg pri BET

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis artikolo de Ulrich Brandenburg pri la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazis julie en Kaŭno kun 296 aliĝintoj (ĉ. 250 reale partoprenis) el 32 landoj; la artikolon garnas kvin fotoj de Gražvydas Jurgelevičius. Legu ĉi tiun artikolon ĉe https://sezonoj.ru/2025/08/bet-202/.

## Per flugiloj de facila vento

Aperis nova artikolo en la retejo<uea.facila.org>, kiun prizorgas **Anna Löwenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/). La artikolon verkis **Rianne Sanders** kun la titolo **Tre plena semajno en Ĉeĥio**, kaj voĉlegis ĝin **Miko Sloper**:
https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/tre-plena-semajno-en-%C4%89e%C4%A5io-r484/

## Estraraj taskoj deciditaj

La Komitato de UEA elektis novan estraron por la Asocio, kiu enoficiĝis la 27-an de julio kaj deĵoros ĝis julio 2028. EKO-komuniko jam prezentis la fotojn de tiuj estraranoj. Informoj pri tiu nova Estraro disponeblas ĉe https://uea.org/asocio/estraro aŭ en la kolofono de la revuo *Esperanto*. La estraranoj konsentis pri taska disdivido. Ĉiu estrarano kalkulos je la helpo de unu aŭ pliaj estraranoj en la diversaj fakoj:

Fernando Maia Jr.

- Kunordigo, Strategio kaj Statuta Reformo (kun helpo de Ó Riain kaj Kadar)
- Rilatoj kun TEJO (kun helpo de Kadar kaj Sabiyumva)
- Aktivula Maturigo (kun helpo de So)
- Ameriko (kun helpo de Ó Riain)

Seán Ó Riain

- Eksteraj Rilatoj (kun helpo de Lo Jacomo)
- Informado kaj Amikoj de Esperanto (kun helpo de Boytcheva, Lo Jacomo kaj Sabiyumva)
- Revuo *Esperanto* (kun helpo de Kadar kaj Arko)
- Eŭropo (kun helpo de Boytcheva kaj Lo Jacomo)

So Jinsu

- Kongresoj (kun helpo de Boytcheva kaj Maia)
- Azio kaj Oceanio (kun helpo de Arko)

Aleks Kadar

- Administrado, Financoj, Centra Oficejo kaj Delegita Reto (kun helpo de Maia kaj Sabiyumva)

- Faka Agado (kun helpo de Lo Jacomo kaj Raveloharison)
- Reta Agado (kun helpo de Maia)

Gong Xiaofeng Arko

- Instruado, Rilatoj kun ILEI (kun helpo de Raveloharison)
- Ekzamenoj, Rilatoj kun Edukado.net (kun helpo de Maia)
- Rilatoj kun la Akademio de Esperanto (kun helpo de Lo Jacomo)
- Bibliotekoj, Esploro kaj Dokumentado, Rilatoj kun CED (kun helpo de Boytcheva kaj Ó Riain)

Zdravka Boytcheva

- Kulturo (kun helpo de Ó Riain kaj Sabiyumva)
- Eldona Agado (kun helpo de Maia)

Miora Raveloharison

- Universitata Agado (kun helpo de Arko)
- Virina Agado (kun helpo de Boytcheva kaj Arko)
- Afriko (kun helpo de Sabiyumva)

Jérémie Sabiyumva

- Landa Agado (kun helpo de Kadar)
- Meza Oriento kaj Norda Afriko (kun helpo de Maia)

François Lo Jacomo

- Scienca Agado (kun helpo de Arko, Raveloharison kaj Maia)
- Esperanto-centroj kaj ZEO-j (kun helpo de Boytcheva kaj Kadar)
- Ĝemelaj Urboj (kun helpo de Ó Riain kaj Raveloharison)
- Terminologio (kun helpo de Ó Riain kaj Maia)

## Kiu volas iĝi milionulo?






Ĉi-semajne la **Kolekto Brazila Muziko** atingis gravan mejlstonon. Ĝi havas jam pli ol milionon da alrigardoj.

Jen frua bosanovo, registrita interalie de **Leny Andrade** kaj **Leila Pinheiro**, nome [Stranga batado](). Ĝia originala titolo estas *Batida diferente*, kaj ĝin verkis **Durval Ferreira** kaj **Maurício Einhorn**:

## Universitataj konsideroj

Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj (La 63-a sesio)

Lunde, la 8-an de septembro 2025, de la 13:30 UTK . Prelegantoj:

- Zohre Ramezani kaj Ahmad Mamduhi: Esperanto en iranaj universitatoj
- Fransoazo Noireau: Esperanto en afrika universitato UEK

Pliaj kontribuoj kaj diskutadoj estas bonvenaj. Organizos kaj gvidos Alessandra Madella kun la helpo de Viko kaj Ahmad Mamduhi. Jen la ĉiama Zoom-ligilo por partopreni en la kunsidoj de Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj:
**https://us02web.zoom.us/j/84502260578**
**Nur se demandite: Kunven-Identigilo: 845 0226 0578**
**Pasvorto: la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj**

La registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en:
1- la jutuba kanalo de UEA: Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj
2- la retejo de IrEA: https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/

## Nova prezidantino por REU

La 9–an kaj 10-an de aŭgusto 2025 en Krasnojarsko (Siberio, Ruslando) okazis la 33-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio (REU), en kiu Svetlana Smetanina estis elektita kiel prezidanto de REU. Ŝi jam estis prezidanto de REU de 2013 ĝis 2019. Smetanina, kiu en decembro festos sian 75-an naskiĝdatrevenon, en 2022 ne estis reelektita kiel la ĉefdelegito de UEA por Ruslando pro siaj komentoj pri la milito en Ukrainio, kiuj, laŭ la Estraro de UEA, ne konvenas al reprezentanto de UEA. REU proteste kontraŭ ĉi tiu nereelekto ĉesis kotizi al UEA kaj pro tio ĝi probable perdos sian membrecon. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto,* https://sezonoj.ru/2025/08/ruslando-67/.

I

========= vortoj: 1030 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
ilei IKEF
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto. //RM ene aug 16